

Intervjuo kun Marinko Givoje el Zagrebo  
pri esploro ĉe CDELI de vortaroj pri planlingvoj  
Radioprelego de Claude GACOND, SRI 704, 1977.04.06 & 08 & 09

Cl.- Parolas Claude Gacond. Hodiaŭ mi havas la honoron intervui Sinjoron Marinko Givoje el Zagrebo, Jugoslavio. Sinjoro Givoje venis Svislandon por serĉado en CDELI, tio estas 'Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale', kiu troviĝas en la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Li faras serĉadon de vortaroj pri planlingvoj. Pri tiu serĉado kaj faka bibliografia laboro ĝuste Sinjoro Marinko Givoje raportos al vi en intervjuo. Sinjoro Marinko Givoje, estu afabla dirante kelkajn vortojn pri viaj profesiaj okupoj.

MG.- Estas iom malfacile, sed mi fakte estasc arĥeologo, mi estas ĵurnalisto, mi estas publicisto, aŭtoro de 20 verkoj, de kiuj duono aperis en Esperanto en diversaj landoj. Kaj krom tio mi havas diversajn hobiajn : speleologio, bibliografio (estas mia ĉefa hobia nuntempa). Koncerne titolojn de verkoj, kelkaj verkoj koncernas mian hejmmregionon, estas en nacia lingvo pri insulo Korĉula. Unu verko estas popularscienca : Sekretoj de marestaĵoj, pri fiŝoj.

Cl.- Ĝi aperis en kolekto Stafeto... ?

MG.- Ne, sed en Jugoslavio aperis, antaŭ kelkaj jaroj. Sed en kolekto de SAT aperis Interesa arĥeologio, en Italio aperis Esperantonimoj, en Jugoslavio de ŝtata eldonejo aperis du vortaroj, tiam: Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio, du bibliografioj de planlingvoj kaj Esperanto-literaturo en Jugoslavio, kaj tiel plu, kaj tiel plu.

Cl.- Kaj, se mi ne eraras, ĝuste pri bibliografio vi venis en Svislandon. Estas ĝuste por via bibliografia okupo ke nun vi restadas unu semajnon en La Chaux-de-Fonds. Kion vi precize venis fari en la biblioteko de tiu ĉi urbo.

MG.- Bibliotekoj kaj esperantaj muzeoj ekzistas ankŭ alie en la mondo. Ne estas multaj, estas kvar-kvin, en Vieno, en Londono kaj en Hispanio, en Hungario. Sed kial ĝuste ĉi tie, ĉi tie en Svislando, en tiu koro de Eŭropo - se mi dirus, ĉu ne - troviĝas la plej riĉa kolekto de planlingva literaturo. Dank'al tio ke en historio ĉi tie aktivis elstaraj homoj kiuj verkis, krom tio kelkatempe, dum kelkaj jaroj sidejo de tuta esperantistaro IEL estis ĝuste en Svislando. Do ne mirinde, ke ĉi tie tio konserviĝis. Kaj laŭdirinde, ke ĝuste en La Chaux-de-Fonds tion oni arĥivas, oni tion konservas dank'al komprenemo de Sinjoro Fernand Donzé, ĉefo de Biblioteko de la Urbo, Pierre-Yves Tissot, bibliotekisto, kaj al helpantoj ne-esperantistoj, kiel ekzemple Alphonse Matejka, adepto de Occidental kaj redaktoro de Cosmoglotta. Tiam mi menciui ankaŭ kelkajn esperantistojn : estas arkivisto Sinjoro Claude Gacond, kiu intervjuas min ĉi tie, Tazio Carlevaro, la prezidanto de Konsulta Komitato de KCE, kaj tiel plu. Aliaj kiuj helpas, ne ofendiĝu se mi ne mencias, sed ilia laboro estas tre grava, tiu arkivado. Mi estas pli ol kontenta pri tiu laboro.

Cl.- La lundon matene, ĝuste en la biblioteko, ĉiam laboras helpantaro, kaj vi ĉeestis tiun momenton, ĉu ne ? Kio estis viaj impresoj ?

MG.- Unue, miaj impresoj estas bonegaj. Oni scias kion oni volas kaj oni tion faras organizite kaj science. Do, sur plej alta scienca nivelo. Tio agrable mirigis min. Ili laboras, ne povas pli multe fari ol kion ili faras, tiu laboro daŭras jarojn. Se oni povus ankoraŭ pliintensigi, trovi

aliajn helpantojn, tio estus bonega afero. Ĉar estas ankaŭ raraj korespondaĵoj, leteroj nepre konservindaj, gravegaj por la historio de planlingvo, por nia socio, por nia kulturo monda ĝenerale.

Cl.- Kaj dum tiu mateno vi komencis la laboron, vi trovis librojn, kion vi faris en tiu momento ?

MG.- Mi jam havas slipon de planlingvaj dokumentoj kaj libroj, vortaroj - ĉefe vortaroj interesas min - sed mi ĉi tie trovis aferojn, pri kiuj mi ne sciis, do estas malkovro por mi kaj estos ankaŭ malkovro por aliaj, kiuj venos ĉi tien labori en la estonteco.

Cl.- Konklude : viaj impresoj ?

MG.- Bonege funkcia libroservo, loĝebleco: Gastejo Edmond Privat, seminarioj, kiujn vi gvidas, eldonado de studoj, kursgvidado kun 300 korespond-kursanoj. Jen tio estas resume ĉio, kio agrable surprizis min. Kaj tio postulas alian elsendon.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Claude Gacond intervjuis Sinjoron Marinko Givoje el Zagrebo. Venontan semajnon vio reaŭdos nin. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*